TEJO-aktuale: numero 378, 2013-12

## TEJO subtenas vojaĝ- kaj restad-kostojn al trajnseminario "Genro kaj Egaleco: al-aga enkonduko" dum IJF, Castelsardo, Sardujo, Italio, 17a ĝis la 22a de Aprilo 2014

Saluton al ĉiuj, mi pensas ke al pluraj el vi povas interesi partopreni tiun ĉi seminarion: De la 17a ĝis la 22a de Aprilo 2014, kadre de la Internacia Junulara Festivalo (Castelsardo, Sardujo, IT), TEJO organizas trejnseminarion titolitan "Genro kaj Egaleco: al-aga enkonduko". Danke al subvencio de la Konsilio de Eŭropo eblos repagi parton de la vojaĝ- kaj restad-kostoj al la partoprenantoj. Kandidatiĝu ĝis la 31a de Decembro 2013 ĉe http://tejoseminarioj.wix.com/genraegaleco. Nepre memoru ke la nuna aliĝkotizo daŭros nur ĝis la 4a de januaro! Decidu rapide kaj faru donacon al vi por la nova jaro: aliĝu al IJF!

### [Esperanto] Mark Fettes: la Esperantisto de la Jaro 2013 ĉe La Balta Ondo

La Ondo de Esperanto en 1998 iniciatis ĉiujaran proklamon de la Esperantisto de la Jaro. Legu pli: http://www.sezonoj.ru/2013/12/fettes-3/

### [Esperanto] Ĵus mi fondis grupon "Esperanto en Germanio"

Bonvolu aliĝi! (La simila grupo "Esperanto-Germanio-Germany" ne funkcias; membroj vane plendis, ke ili ne povas afiŝi ion tie.) https://www.facebook.com/groups/esperanto.germanio

### [EDU]-Novaĵoj: Detektivu pri la novaj eroj en la retejo

En la lastaj du semajnoj okazis ŝanĝoj, plibonigoj de kelkaj retejaj funkcioj, eĉ lanĉiĝis nova modulo. Estas almenaŭ 10 ŝanĝiĝoj kiuj estas percepteblaj ankaŭ al vi, uzantoj, sed kompreneble ne ĉiuj estas facile troveblaj. Ni lanĉis nun serĉludon kaj donos premiojn al tiuj, kiuj trovas plej multe da el tiuj novaĵoj. Legu pli ĉe la paĝo: http://edukado.net/novajhoj?id=409

### "Regestilo" de Jonny M. aĉetebla dum JES

Ĉu vi ŝatas la albumon "Regestilo" de Jonny M., sed ankoraŭ ne aĉetis ĝin? Dum la 5-a Junulara E-Semajno vi havos la okazon, akiri ĝin tra mi! La albumo de la jaro, kies kantojn mi grandparte aŭskultis la unuan fojon antaŭ unu jaro dum la 4a JES kaj kies muziko akompanis min tra la tuta jaro! http://www.youtube.com/watch?v=4dic5O5riEI (La prezo antaŭvideble estos 15 EUR.) Kontaktu Cyrille: cyrille.poullet ĉe facebook.com

### [Esperanto] Ne forgesu subteni duon-oficialigi Esperanton en la mez-lernejoj de Brazilo.

Disvastigu la peticion kaj informu amikojn: http://www.avaaz.org

### [ret-info] Internacia Esperanto-Muzeo en Ĉinio

*Malsukcesa elŝuto.*

### Sezonaj informoj

- Jen plurlingva kalendaro 2014 kun kelkaj utilaj vortoj de vortlistoj...http://s3-eu-west-1.amazonaws.com/lingolia/calendar/2014/lingolia_2014_multi.pdf

- Kristnaska rakonto en Esperanto: http://www.youtube.com/watch?v=Cue7M9_GHNQ

### Aljuĝo de la 14-a Esperanto-Kulturpremio 2014

FAME-Fondaĵo por stimulado de internaciaj kompreniloj kaj Urbo AALEN:

Premiotoj tiufoje estas du enloĝantoj de la urbo Aalen, pro iliaj meritoj en la engaĝo por la kulturo de internaciaj kompreniloj, specife pri la librokulturo de Esperanto kaj ĝenerale de planlingvoj.

Depost aŭgusto en 1908 ekzistas la Germana Esperanto-Biblioteko kiel grava kaj baldaŭ poste iu el la monde plej grandaj kolektoj sur tiu ĉi kampo. Kaj je la 15.12.1989, do ekzakte antaŭ nun 24 jaroj ĝi trovis novan hejmon en la urbo Aalen.

Pri la premiotoj dipl. inĝ. Utho Maier kaj apotekisto Karl Heinz Schaeffer:

- Sen iliaj iniciato kaj energia kunhelpado siatempe ne estus garantiata la daŭra pluvivo de le biblioteko.

- Sen ilia nelacigebla engaĝo por tiu ĉi kolekto, ĝi ne prosperus tiel, kiel ĝi sin prezentas nuntempe.

- Sen iliaj daŭre obstinaj ambicioj por tiu projekto, certe ties estonteco kaŝiĝus en necerteco nebula.

La urbestro Gerhard Walter el Herzberg, la Esperanto-urbo, pretas prelegi la laŭdon pri iliaj meritoj.

La premiado okazos enkadre de matineo dimanĉe, la 30.3.2014. Publiko kaj gazetaro estos invitataj ĝustatempe.

La bildon de la premiotoj fotis Hedwig Schaeffer kaj estas elŝuteblaj en tiu retejo: http://esperanto-kulturpremio.de.nr/

### Venontaj renkontiĝoj

30a Internacio Festivalo, Nördlingen, Germanio, 27a de decembro 2013 ĝis 3a de januaro 2014, http://www.internacia-festivalo.de

12-a Novjara Renkontiĝo (NR) kaj la 5-a Novjara Internacia Semajno (NIS) en Saarbrücken, Germanio, 27a de decembro 2013 ĝis 3a de januaro 2014, http://www.esperantoland.org/nr kaj http://www.esperantoland.org/nis

5-a Junulara E-Semajno, Szczawno-Zdrój, Pollando, 28.12.2013 ĝis 04.01.2014, http://jes.pej.pl/2013/

Jarfina FESTego, Greziljono, Francio, 28a de decembro 2013 ĝis 2a de januaro 2014, http://gresillon.org/jarfine

SANO 4, Herzberg – la esperanto urbo, Germanio, 29a de decembro 2013 ĝis 2a de januaro 2013, esperanto-zentrum ĉe web.de

5-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE), 29a de decembro 2013 ĝis 4a de januaro 2014, Kotonuo, Benino, http://mirejo3.blogspot.com

5a Novjara Aranĝo (NOVA), Petropolo, subŝtato Rio-de-Ĵanejro, Brazilo, 2-a ĝis la 5-a de januaro 2014, http://novjaraaranĝo.wordpress.com (Skribu x-kode)

Studsabato- en CDELI, La Chaŭx-de-Fonds, Svislando, 18a de januaro 2013, Esperantokursoj kun tri niveloj. Inf.: Nancy Fontannaz, Ruisselet 9, CH-1009 Prilly, Svislando. Rete: nancy.fontannaz ĉe gmail.com kaj http://www.cdeli.org/

1a Internacia Esperanto-Kongreso en Nikaragvo, Granada, Nikaragvo, 24a ĝis 27a de januaro 2014, http://www.esperanto-nicaragua.org/eo/kongreso aŭ https://www.facebook.com/events/633860309978810/

Studsabato- en CDELI, La Chaŭx-de-Fonds, Svislando, 15a de februaro 2013, Esperantokursoj kun tri niveloj. Inf.: Nancy Fontannaz, Ruisselet 9, CH-1009 Prilly, Svislando. Rete: nancy.fontannaz ĉe gmail.com kaj http://www.cdeli.org/

La 2a sudazia Seminario okazos en Lahor-urbo, Pakistano, 25a Februaro ĝis 1a Marto 2014, https://www.dropbox.com/s/zxoj3pyz0szrphm/UNUA%20BULTENO%20de%202a%20SAS%20en%20Pakistano.pdf

Studsabato- en CDELI, La Chaŭx-de-Fonds, Svislando, 15a de marto 2013, Esperantokursoj kun tri niveloj. Inf.: Nancy Fontannaz, Ruisselet 9, CH-1009 Prilly, Svislando. Rete: nancy.fontannaz ĉe gmail.com kaj http://www.cdeli.org/

5-a PRINTEMPE, Marienburg, Germanio, 14-a ĝis la 21-a de aprilo 2014, http://www.esperantoland.org/printempe

Internacia Junulara Festivalo 2014, Castelsardo, Sardegna, Italio, 16a de aprilo ĝis 22a aprilo 2014, http://iej.esperanto.it/ijf/

Studsabato- en CDELI, La Chaŭx-de-Fonds, Svislando, 26a de aprilo 2013, Esperantokursoj kun tri niveloj. Inf.: Nancy Fontannaz, Ruisselet 9, CH-1009 Prilly, Svislando. Rete: nancy.fontannaz ĉe gmail.com kaj http://www.cdeli.org/

29a Printempa Semajno Internacia (PSI), Xanten, Germanio, 14a ĝis 21a de aprilo 2014, http://www.esperanto.de/psi

Studsabato- en CDELI, La Chaŭx-de-Fonds, Svislando, 17a de majo 2013, Esperantokursoj kun tri niveloj. Inf.: Nancy Fontannaz, Ruisselet 9, CH-1009 Prilly, Svislando. Rete: nancy.fontannaz ĉe gmail.com kaj http://www.cdeli.org/

91a Germana Esperanto-Kongreso (GEK), Erfurt ; Germanio, 6a ĝis 9a de junio 2013,

MARO, Mara Renkontiĝo, apud St. Tropez , Mediteraneo, Francio, ĉ. 31-a de majo ĝis 14-a de junio 2014, http://www.esperantoland.org/eo/kontakto.html

Studsabato- en CDELI, La Chaŭx-de-Fonds, Svislando, 21a de junio 2013, Esperantokursoj kun tri niveloj. Inf.: Nancy Fontannaz, Ruisselet 9, CH-1009 Prilly, Svislando. Rete: nancy.fontannaz ĉe gmail.com kaj http://www.cdeli.org/

Roskilde Festivalo 2014, Roskilde, Danio, 28a de junio ĝis 6a de julio 2014, http://roskilde.festoklubo.dk/rf14 aŭ https://www.facebook.com/events/204648439659455/

La 50-aj BALTIAJ ESPERANTO-TAGOJ (BET-50), Jelgava, Latvio, 28-a de junio ĝis la 5-a de julio 2014, http://www.esperanto.lv/index.php/lang-eo/la-50-aj-baltiaj-esperanto-tagoj-bet-50

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu